

# HEROLDO

Administracio kaj Redakcio: Köln, Brüsseler Strasse 94, Germanlando. Redakcio ne resendas manuskriptojn nepetitajn. Honorario nepagebla. Abonprezo (nur antaŭpage): unu numero 0.25 gmk. aŭ egalvaloro; abono trimonata 3.— gmk.; sesmonata 5.— gmk.; tutjara 10.— gmk. Per poŝtoficejo kvaronjare 2.70 gmk., en Germanlando monate 0.90 gmk. Ĉe tri samdaŭraj abonantoj al unu adreso, kvara abono estas senpaga.

# DE ESPERANTO

SEMAJNA SENDEPENDA ORGANO DE LA ESPERANTO-MOVADO · UNIVERSALA · ILUSTRITA

Anoncoj: unumilimetra kolonero (62 mm larĝa) kostas 0.10 gmk. aŭ egalvaloron. — Anoncetoj: ĉiu vorto aŭ mallongigo kostas 0.05 gmk. 20 vortoj kostas 1.— gmk. aŭ 4 int. respond-kuponojn (nur antaŭpage). Ĉe pli oftaj aperigoj de la sama anonco rabato laŭ speciala prezlisto.

Por pagoj uzu prefere niajn poŝtajn ĉek-kaj girokontojn: en Nederlando n-ro 248 123 („Heroldo de Esperanto“, Rotterdam); en aliaj landoj (ĉiuj funkcias sub la firmo: „Heroldo de Esperanto“, Köln.

Germ.): Bruxelles 204 404, Budapest 59 379, Köbenhavn 49 62, Köln 1117 76, Milano 3/954, Praha 78 193, St. Gallen IX/4602, Warszawa 191 094, Wien D 62 473, Zagreb 408 14. — Alilandanoj pagu per poŝtmandato.

N-ro 20 (881) 4-paĝa

Deksepajarkolekto

17 majo 1936

## Esperanto — kulturperanto.

### Esperantan-ĉeĥoslovakon festvesperon en Amsterdam partoprenis la ĉsl. ministro. Ĉu denove unu fojon Universala Kongreso en Nederlando?

#### Esperanto — kulturperanto.

Denove en Nederlando oni povas registri altvaloran sukceson de nia movado. La tutmonda esperantistaro ŝuldas profundan dankon al la nederlandaj simpatiaj kaj celkonsciaj verdsteluloj, ludantaj altgradan rolon en la verda regno. La 27-an de aprilo LEEN kaj la Ĉeĥoslovaka Informoficejo en Haag kune aranĝis en la granda salono de la hotelo „Krasnapolsky“ en Amsterdam imponan Esperanto-ĉeĥoslovakon vesperon sub la protektado de la Sendito (ministro) de Ĉeĥoslovakujo en Nederlando, lia ekscelenco D-ro Ivan Krno.

Multaj eminentuloj apartenis al la honora komitato. Kelkcentoj da personoj, inter ili multaj el la decidiga Amsterdama societa sfero, ekz. la edzino de la ministro, diplomatoj, scienculoj k.a. donis al ĉi tiu kaveno specialan reliefon. S-ano Baas, prez. de LEEN, salutis la gastojn nederlandlingve, la ministron Esperante. La ministro en sia bela parolado menciis trafe la valoron de Esperanto, finante per la vortoj en nia bela lingvo: „Kaj al la Esperanto-movado mi deziras bonan sukceson.“ Universitata profesoro van Wijk el Leiden kaj direktoro s-ro Polak el Haag parolis pri la historio kaj pri la ekonomia evoluo de Ĉeĥoslovakujo. Interesaj paroladoj. Ĉefiaj klasikaj muzikajoj de Smetana kaj Dvořák ĉirkaŭornamis la programon. La dua parto estis dediĉita al filmoj pri Ĉeĥoslovakujo, kaj mi donis en Esperanto la necesajn klarigojn. Antaŭ la prezentado oni ludis la Esperantan himnon, komencvespere la ĉefan kaj la nederlandan himnojn. La gazetaro estis reprezentita de raportistoj. La vespero klare manifestis la praktikan utilecon de Esperanto, samtempe estante bonsukcesa kaj utila por nia movado. Certe inter la eminentuloj estis multaj, kiuj la unuan fojon aŭdis Esperanton kaj per tio spertis, ke ĝi ne estas io sensanga malvivaĵo; sed, kontraŭe, ke Esperanto estas belsona, plenviva interkomprenilo inter diverslingvaj homoj, kaj la plej bona rimedo por forigi la lingvajn barilojn. Tiaj aranĝoj potence antaŭenirigas niajn laborojn kaj disvastigas la Zamenhofan verkon en la ĝis nun nur treege malfacile alireblaj societaj sferoj.

Nun iom pri la tipa de l' naturo verda kaj kaj per la verda stelo verdiginta Nederlando! Iom el miaj tieaj travivaĵoj:

Nenie mi renkontis tiom da samlingvanoj. En la tramoj, en la vagonaroj, en la stacioj, ĉie, aŭ konduktoroj, aŭ oficistoj aŭ staciestroj en ruĝaj deĵorĉapoj salutis min: „Bonan tagon (vesperon), samideano!“ Ofte estiĝis vigla konversacio, kiel ekzemple en la stacio A . . . kie la deĵoranta staciestro pro vigla interparolado preskaŭ forĝesis anonci ekvetur-signalon kaj doninte ĝin, ĉi ankoraŭ revenis al mia vagono kaj kore kiel vera amiko adiaŭadis, ĝis la vagonaro malaperis. En Amsterdam, en Rotterdam, en Hago ktp. surstrate oni alparolis min, oni informis, eĉ gvidis min kaj montris al mi vidindaĵojn. Tio estas ĝojigaj faktoj, kiuj estiĝis en mia kapo la penson, ke ni devus nepre konsideri tion kaj denove unu fojon elekti tiun belan, altkulturan, feliĉan landon kiel kongreslandon. Oni ne timu la altan valuton. Per lerta aranĝo — kaj tian la nederlandanoj bone komprenas — oni certe ankaŭ al la neriĉaj esperantistoj ebligis la partoprenon. Mia opinio la propono estas pripensinda, kaj mi pri tio ne dubas, ke la kongreso en tiu progresema lando alportus al nia movado novajn fortojn kaj eĉ neatenditajn sukcesojn. Ne kredis, ke la pro-

pono estas facilanime kaj senpripense farata! Mi iam preparis kaj kunaranĝis kelkajn kongresojn, kaj tial mi eble povas diri, ke iom da spertoj sur tiu por nia movado plej grava laborkampo al mi ne mankas.

La lando, tiom interesa laŭ vidpunkto de glora historio, altgrada arto kaj kulturo, — la lando, super kiu plenlume brilas la Zamenhofa verda stelo, ĝi estas la antaŭdeŝtinita kongreslando.

Mi bone scias, ke kiel simpla soldato de la verda pacarmeo mi transpaŝas la al mi permesitajn limojn; tamen bonvolu senpasi pripensi la sugeston de tiu, kiu jam tridek jaroj kunlaboras en Esperantujo.

J. Glück.

#### La „artefariteco“ de Esperanto.

En la Heroldo n-ro 16 s-ro Nekonatulo skribis interesan artikolon pri la supre menciita temo; sed la verkisto, tamen, ŝajne deziras pruvi, ke Esperanto ne estas tiom artefarita, kiom oni ĝenerale pensas. Li ankaŭ verŝajne opinias, ke artefariteco estas malpli bona kvalito de la lingvo, karaktero evitinda!

Nun, mi ne intencas diskuti la temon, ĉu Esperanto estas grandgrade aŭ malgrandgrade artefarita, ĉar tio neniel koncernas aŭ tuŝas la taŭgecon de la lingvo; sed ĉar ankaŭ mi scias, ke lingva artefariteco ĝenerale estas rigardata kiel malbona kvalito, mi tial demandas: Ĉu la naciaj lingvoj ne estas artefaritaj? — Kaj mi respondas tuj: **Jes, ĉiuj lingvoj estas artefaritaj!** —

Kiel fariĝis la lingvoj? — Neniu scias pri la formo de la unua lingvo, la origina, pratempore parolita; sed la logiko nepre diras, ke ĝi estis tre simpla, tre malampleksa, nur sufiĉanta por la primitiva popolo, kiu uzis ĝin kiel esprimilon por siaj primitivaj pensoj. Certe estis nur sonoj de simpleco, per kiuj la homoj nur post longa praktiko povis komprenigi sin, unu al la alia.

Cetere la nun parolataj lingvoj posedas certajn trajtojn de tiu antikva formo de lingvo. Ekzemple en la dana lingvo oni diras, ke ĉevalo „vrinsker“ (—er estas verba formo en estanta tempo), kaj oni imitas per la sono la ĉevalan parolon. Tute same oni diras, ke la ansero „gækker“ (diru: gek'er), ke la kato „mjaver“, ke la kokino „kagler“, la kolombo „kurrer“, kaj la ŝafo „bræger“. Plue la botoj „knirker“ (knaras), la kanono „tordner“ (tondras), la tondilo „klipper“, la sonorilo „klinger“ aŭ „runger“, la vento „suser“, la pluvo „siler“, la serpento „hvisler“ (viŝler), la malgaja viro „brummer“ ktp.

Kompreneble, aliaj lingvoj posedas similan esprimformon.

La imitado de bestaj, homaj, objektaj kaj eĉ fantaziaj sonoj estas multekonata trajto en la diversaj lingvoj, kaj ĝi ankaŭ estis unu de la komenco en Esperanto: la hundo bojas, la ansero blekas, vento blovas, la koko krias, kukolo kukas, muziko tonas, foliaro tremas, kaj la homaro skuas la mondon.

Krom tiuj specoj de vortoj multaj aliaj eroj kaj formoj de lingvo fariĝis en tute sama maniero, povanta pentri antaŭ la fantazio la ideon aŭ la bildon de la penso. Sed se la lingvoj nuntempe estas tiugrade esprimoblaj, multe superantaj la pratemporan, primitivan lingvon, aŭ se oni ne plu povas rekonii la malmodernan lingvon en ili, — la kaŭzo en ambaŭ kazoj estas la artefaro, kiun faris la homoj dum pasantaj tempoj.

Oni scias, ke la angla lingvo estas tre miksa idiomo kun simpla gramatiko kaj amaso da vortoj kaj sinonimoj, ke la germana estas pli konciza kun malpli simpla gramatiko, la rusa estas „malnova“ kun antikva gramatiko, itala belsona, moderna, ŝajnanta renovigita latino, ke hispana estas la plej dresita kaj ordigita lingvo en la mondo ktp.; sed pro kio ili diferencas, aŭ en formo, aŭ en alia aspekto? — Simple ĉar la homoj ŝanĝis iljn sen ia ajn plano kaj laŭ nevola, nekonscia plaĉo.

Pro kio ne ekzistas la artikolo en la rusa

kaj latina lingvoj? — Pro kio sonas la vortoj „la viro, la virino kaj la infano“ germane: „der Mann, die Frau und das Kind“, angle: „the man, the woman and the child“, france: „le monsieur, la dame et l'enfant“ kaj ruse: „ĉelovjék, jenĉina i ditjâ“? — Ĉar la formoj, nun uzataj, plej bone plaĉis al la popoloj, kiuj uzas ilin, pro alia kaŭzo absolute ne!

Jes, ĉiuj lingvoj estas de sia pratempa finto ĝis la nuna traprovita stato . . . artefaritaj, produktoj de homa scio kaj povo. Dio donis al la homoj la parolpovon; sed la lingvoj estis verkoj de la homoj mem.

Arto, arteco kaj artefareco estas en tiu kompreno maldecaj vortoj. Ili portas la penson al iu surogata, al iu ne pura aĵo. Nek la naciaj lingvoj nek Esperanto estas surogatoj; ambaŭ egale taŭgas por la destinita celo, ambaŭ honeste servas kiel kompreniloj de grandega valoro por la ĉiam serĉanta homaro. Ili ne estas anstataŭaĵoj de io pli pura, pli bona.

En penseble tre malproksima tempo, kiam la landaj kaj lingvaj limoj estos forigitaj de pli saĝaj homoj ol la nunaj, la naciaj lingvoj sendube fluos unu en la alian, kun lingva kerno en la centro de la lando kaj larĝaj zonoj de miksaĵoj al la najbaraj lingvoj, certe kiel dialektoj en la nunaj lingvoj (? Red.); sed la internacia lingvo konstante servos al sia propra celo: esti ligilo inter la diversaj popoloj en la diversaj regionoj. Kaj ĉar neniu homo en tiuj venontaj tempoj, kiam nenia landlimo baros la liberan interrilaton kaj nenia ekonomia stato malhelpos ĝin, povos esti sen la internacia lingvo, — ni esperantistoj provizore nur havas la taskon konservi la lingvon ĝis la tempopunkto, je kies veno ĝi estos neceseco por la homaro kaj absoluta bezono.

Tamen: se lingva artefareco estas la ilo, per kiu ĉiuj lingvoj povas evolui kaj fariĝi pli taŭgaj, pli utilaj, pli simplaj, pli esprimoblaj, pli facilerneblaj, en unu vorto: **pli bonaj**, — tial la artefareco ne estas manko aŭ difekto, sed granda profito por la lingvoj, kaj tiun kvaliton ni salutu kun ĝojego!

Esperinde la eterne batalanta homaro ĝis tiu tempo per iu ajn simila artefareco povos atingi la saman altan, ĉarmegan kvaliton!

Ĝis nun la demando ne estas, ĉu Esperanto estas taŭga kaj utila servisto por la homaro; la demando estas sole, ĉu la homaro estos utila kaj taŭga por Esperanto kaj meritus ĝin. Oluf Hansen.

#### La spertoj de Julio Baghy en 80 urboj de tri landoj.

La 18-an de aprilo parolis en la Buda-pesta ERA-rondo Julio Baghy pri sia prelegvojaĝo en Svisujo, Francujo kaj Belgujo. La parolado estis tre interesa, ĉar li pripentris la esperantistan vivon en la diversaj landoj kaj grupoj montrante la bonajn kaj malbonajn flankojn de la movado. Entute li faris en 80 urboj kaj urbetoj paroladojn pri la Esperanta literaturo, al pli ol 10 000 personoj.

En Svislando la movado stagnas, kio ne signifas morton, sed altniveligon de la akirita kvanto. Li miris, ke tie ne estis interrilato inter UEA kaj la lokaj esperantistoj. Ankaŭ multaj gvidantoj estas aŭ forpuŝitaj, aŭ pro alia kaŭzo retiriĝis. La malnovaj gvidantoj de UEA laciĝis laŭ lia sperto, kaj la financoj estis tro altaj por UEA en Svisujo, ja por la salajro de la direktoro oni povus havi en Belgujo grandan oficejon kaj pagi plurajn oficistojn.

En Francujo li trovis alian atmosferon, kiu ankaŭ laŭloke variis pro la lokaj cirkon-



#### Obra Rondo Esperantista (ORE)

nomiĝas grupo de serioze laborantaj samideanoj pollandaj (pastroj kaj klerikuloj), kiuj en monaĥejo studas Esperanton, por poste uzi ĝin publike. La nomoj de la sidantaj pastroj estas (de maldekstre dekstren): Sajewicz, Rabięga, D-ro Kocol, Parusel kaj Bullenda. Jen la adreso de la grupo: Obra Rondo Esperantista (ORE), Klasztor Oblátow, en O b r a, powiat Wolsztyn, Pollando.



stancoj. Laŭkestere estas granda movado: 4500 pagantaj membroj (en la neŭtrala societo), precipe ĉar multaj simpatiantoj aliĝis. Sed estis grupoj, kie el 40 nur 2—3 parolis la lingvon. Li vidas la kaŭzon en tio, ke en Francujo komenciĝis en frua tempo la grandskala esperantista movado kaj la ankoraŭ vivantaj pioniroj — kiuj parte eĉ jam ne scias Esperanton — pro sia aĝo kaj aŭtoritato premas la movadon, kaj pro tio ne povas evolui la laboro de junaj fortoj. Kie junaj homoj laboras, tie oni vidas tuj grandan progreson. Multloke malhelpas la lokaj cirkonstancoj; ĝuste la fakto, ke estraroj oficiale simpatias, ne donas okazon por labori, ĉar la sukceso ŝajne jam ekzistas anticipe. Se estas kontraŭstaro ĉe la estraroj, la francoj laŭ opinio de Baghy pli energie laborus.

Estis kelkaj mirinde bone organizitaj grupoj. En **Limoges** ekzemple el 80 personoj 75 bone parolis, la uzado de la biblioteko estas deviga (400 libroj), kaj oni tuj aĉetis librojn por 700 francoj (senkompare pli multe ol en granda Parizo). En **Romanc** la grupestro estas mem la urbestro, tie (kaj ankaŭ kelkloke) okazis oficiala akcepto siena en la urbdomo. En **Lyon** ankaŭ grandaj grupoj funkcias, la universitata grupo havas 500 membrojn. Sed en **Parizo** estas tro disaj la grupoj, kaj eble malhelpas, ke oni rigardas Esperanton nur kiel servanton al la paco, do kiel ian simpatian aferon, sed ne praktikan. —

Baghy miris, ke multloke la esperantistoj, eĉ gvidantoj, ne konis la nomojn de Kalocsay kaj Baghy; pri Budapeŝt oni sciis, ke ĝi estas en — Aŭstrio, kaj la hungara lingvo estas — germana dialekto. Esperantistoj devus esti pli bone informitaj ĝuste per Esperanto pri aliaj popoloj. Cetere lia sento estas, ke en Francujo nun komencas denove vivi Esperanto, precipe dank' al la tre agema sekretario de SFPE s-ano **Petit** kaj kelkaj junaj gvidantoj. Sed oni devas danke rememori tiujn bonhavulojn, kiuj ofte per monsumoj helpas la francan movadon.

En **Belgujo** Baghy vizitis nur kvar lokojn, sed trovis ĉie veran esperantistan atmosferon; la kunvenojn oni vizitis multnombro, oni bone parolis la lingvon kaj oni estas lingve kaj literature bone kulturitaj.

Baghy ankaŭ rakontis interesajn detalojn pri vizito ĉe sudfrancaj vilaĝaj grupoj kaj la tie spertita vere idealista, fervora laboro. La vojaĝo de Baghy ĝenerale donis novan fidon en la interna forto kaj persisteco de la movado.

## Hindo rigardas Svedlandon.

Dum la lastaj jaroj oni renkontis en la Esperanta gazetaro ofte la nomon de Lakshmiwar Sinha. Plej ofte la kronikoj rakontis pri liaj sukcesaj prelegoj en Svedlando, sed li vizitis ankaŭ aliajn eŭropajn landojn, eĉ Islandon kaj la Feroajn Insulojn.

S-ro Sinha antaŭ kelkaj jaroj venis Svedlandon por tie studi svedan slojdon. Hazarde li konatiĝis kun Esperanto kaj lernis ĝin. Per tio li ricevis multajn amikojn svedajn, kaj oni petis lin fari antaŭ Esperanta publiko prelegojn pri sia interesplena hejmlando. Tion li ankaŭ faris, kaj la famo de la nova hinda samideano disvastiĝis rapide tra la lando. La sekretario de la landa asocio organizis prelegvojaĝojn, kaj s-ro Sinha kelkfoje traveturis kiel prelegisto la vastan landon.

Post kelktempa restado en sia hejmlando li denove venis Svedlandon, kie li estis plej kore salutata de la esperantistoj. Kvankam li volis sin dediĉi nur al studoj pri la lando kaj precipe ĝia slojdo, li devis denove fari prelegvojaĝojn. Antaŭ sia reveturo al la hejmlando en la malproksima oriento li volis esprimi sian simpatian al Svedlando kaj ĝia popolo. Pro tio li nun verkis libron, kiu ricevis la titolon „Hindo rigardas Svedlandon“. La aŭtoro montras en ĝi, ke li tre bone konas la landon kaj ĝian popolon. Li vizitis ĉiujn provincojn kaj kun granda amo li priskribas ilian variantan naturbeleon kiel ankaŭ la amindajn ecojn de la popolo. Post nelonga enkonduka ĉapitro kun ĝenerala informoj pri Svedlando kaj ĝia ekonomia vivo sekvas ĉapitroj pri Stockholm kaj lokoj ĉirkaŭ la lago Mälaren, Gotlando — la estinta reĝino de Balta Maro, Dalarna — la koro de Svedlando, Vermland — la lando de Gösta Berling, Småland kun la urbo de Almetoj ktp. Li priskribis vizitojn ĉe fiŝistoj kaj ĉe laponoj, plej nordaj loĝantoj de la lando. En du tre interesaj ĉapitroj la aŭtoro vigle priskribas la svedan slojdon kaj svedajn morojn kaj kutimojn, kiujn li trovis rimarkindaj.

Antaŭparolon verkis la profesoro ĉe la Universitato en Uppsala Björn Collinder.

La interesan kaj je faktoj tre riĉan libron plibeligas ne malpli ol 128 bildoj.

La libro de Sinha sendube kaptos la intereson de la esperantistoj en ĉiuj landoj. Estas malofajto, ke orientano tiel serioze studas la naturon kaj kulturan vivon de okcidenta lando, ke li poste kapablas verki riĉenhavan libron pri la temo, kaj en la historio de la Esperanta literaturo tio estas ĝis nun unikaĵo.

Vidu ankaŭ la recenziĝon kun pli detalaj indikoj pri la libro!

## Ĉu nacia lingvo sufiĉas?

Antaŭpasintan semajnon la Vienaj gazetoj raportis al sia legataro pri proceso, en kiu la akuzito kaj la akuzanto estis ĉinoj, kaj por ke oni ne estu embarasata pro lingvaj malfacilaĵoj, ankaŭ interpretisto estis invitita. Por ke la sekvantaj linioj estu pli bone kompreneblaj, mi priskribas la interpretiston. Li estas samlandano de la procesintoj, do ankaŭ ĉino. Li instruas en la „Konsulara Akademio por Orientaj Lingvoj“ kaj estas docento. Kaj nun ni vidu, kio okazis dum la proceso.

Ĝi komenciĝis; la akuzparolado estis parolita kaj la juĝisto demandis la akuzitan ĉinon, ĉu li komprenis ĝin. La akuzito staris senmove kaj nenion respondis, li scias paroli iomete la germanan lingvon, sed li tamen ne rediris ion al la demando de la juĝisto, ĉar li ne komprenis la akuzparoladon. La klopodanta juĝisto uzis ĉiujn artifikojn por paroligi la kvazaŭan mutulon, sed liaj penadoj restis sensukcesaj; fine li petis la ĉeestantan interpretiston, ke li traduku al sia samnaciono la akuzatan parolon. Kaj nun la aŭskultantaro travivis procesan spektaklon, kiu klare montras al ni esperantistoj, kiel gravega estas internacia helplingvo.

Li ekparolis detale la kulpigajn frazojn al sia samlandano, dum la aŭskultantoj scivolome observis la interkompreniĝon. La interpretisto finis sian parolon, kaj en la salono regis „mus-trankvilo“: ĉiuj estis scivolegaj, kion nun respondos la alparolito. La kvazaŭa mutulo ree restis muta.

Denove komenciĝis la sama spektaklo. La tradukitaj frazoj estis ree parolataj de la interpretisto.

La juĝisto videble nervoziĝis, la scivolularo ekamuziĝas pro la muteco de l' akuzito. Fine komencas paroli la akuzito, sed bedaŭrinde li nek povis kompreni sin kun la juĝisto nek kun sia samlandano. Sarkasme diris la juĝisto al la interpretisto: „Mi opiniis, ke sufiĉas inviti lingvo-eksperton, sed nun mi havas alian opinion.“

Petante pardonon, pro neplenumo de la juĝista deziro, la interpretisto senkulpigis sin, ke lia samnaciono estas sudprovincano, kiu parolas la tian dialekton, kaj li nur la literaturlingvon. Konfuzita estis la juĝisto, kaj li tre verŝajne cerbumis pri procesprokrasto.

Nur tempeto estis pasinta, kaj la scivolo de ĉiu, eĉ de la juĝisto estis direktita al la mezo de la juĝa salono, ĉar de tie estis aŭdataj voĉoj. Pli bone rigardinte, oni povis observi tri interparolantajn, mangestantajn ĉinojn. Kelkan tempon daŭris la diskutado de la tri uloj kun oblikvaj okuloj, sed poste la juĝisto interrompis ilian diskutadon, demandante ilin, ĉu eble ili povas traduki al sia samnaciono lian kulpon. Unu el ili ekstaris kaj diris jargone, ke la akuzito estas lia provincano kaj ke li ankaŭ provu kompreni sin. Unue li alparolis sian samlandanon kaj ankaŭ ricevis de tempo al tempo respondon, la respondon li tradukis en la literaturan lingvon kaj la profesia interpretisto tradukis ĝin en la germanan lingvon. Nun la juĝisto demandis, kaj la demandado komenciĝis laŭ malrekta maniero. Per tiu malfacilega tradukmaniero finfine la akuzito ankaŭ estis kondamnata.

Fr. W.

## Esperanto-sekcio ĉe Internacia Amikeca Ligo en Londono.

En Anglujo estas sufiĉe granda junulara asocio kun la nomo „International Friendship League“, fondita en 1930, kiu volis servi al junaj alilanduloj vizitantaj Anglujojn, per la konatigo al junaj geangloj samaĝaj. Komence ĝi havis nur 8 anojn. Sed nun ĝi havas jam pli ol 6000 membrojn en Londono mem, kaj filiojn en Ĉeĥoslovakujo, Danujo, Nederlando, Hispanujo, Svislando, Svedujo, Norvegujo, Francujo kaj Belgujo. En tiuj landoj ĝi havas centrojn por pasigi libertempon je treege malaltaj prezoj. Inter la anaro estas tri anglaj parlamentanoj, ankaŭ kvar „Mayors“ (urbestroj) de Londono.

Tamen en tiu asocio la simpatiantoj al Basic English estas bone reprezentitaj. Unu el la vicprezidantoj estas la aŭtoro H. G. Wells, kiu estas fervora kredanto en B. E. Kaj mi bedaŭras konstati, ke la pliparto de la estraranoj samopinias. Malgraŭ tio, antaŭ dek monatoj mi aniĝis al la ligo, kaj post longa klopodado mi sukcesis fondi Esperanto-sekcion en Suda Londono kun 19 anoj. Oni instruas laŭ Cseh-metodo (la aĝlimo de IFL estas inter 16 kaj 30 jaroj), kaj mi havas minimume 75% ĉeestecojn ĉiusemajne. Ili estas fervoregaj, kaj farita konkurso donis bonan rezulton. Interesa estas ankaŭ la fakto, ke estis iam en la Sudlondona filio de IFL ne malpli ol ses sekcioj (por dramo, piedpilkado, biciklismo, naĝado, germana lingvo kaj Esperanto), sed nun ekzistas nur la drama kaj Esperanto-sekcioj, la ceteraj pro diversaj kaŭzoj mortis. La drama sekcio havas 24 anojn oficiale, sed nur 7 estas vere aktivaj, el kiuj 4 estas ankaŭ anoj de la Esperanto-kurso.

Unu rezulto de mia klopodo estas la fakto ke IFL jam aranĝis libertempan centron en la „Maison des Etudiants“ en Bruselo, dum la lastaj du semajnoj de aŭgusto, kaj por

la sama tempo ankaŭ tendaron apud Birmingham. Ankaŭ oni jam estas tre interesiĝita pri venontaj kursoj en aŭtuno. Sed estus tre utile (por ke oni ne kredu, ke la solaj esperantistoj en la mondo estas kelkaj frenezuloj anglaj), se eksterlandaj gesamideanoj gratulus la estraron de IFL pro tio, ke ĝi kuraĝigis anojn fondi Esperantajn sekciojn. Oni skribu al jena adreso: The International Friendship League, 13, Tavistock Square, London W. C. 1, Anglujo.

F. C. Midas.

## Grandaj jubileaj festoj en Malmö.

Dum la paskaj tagoj festis la Klubo Esperantista de Malmö sian 30-jaran jubileon. Okazis grandaj kaj bone vizititaj festaraĝoj. La ĉefa punkto estis la solenaĵo en Knut-salono (urbodomo). La tuta programo estis en Esperanto. Ĉeestis 300 gesperantistoj de nia regiono; el eksterlando venis granda aro da danoj, kelkaj germanoj kaj unu ruso. Al la danoj ni ŝuldas specialan dankon, ĉiam ili venas multnombro al niaj aranĝoj.

Pri la programo ni mencias la jenajn punktojn: salutparolado de la prezidanto Jan Strömne; prologo de nia poeto W. Johansson; disdonado de diplomo al tiuj, kiuj konstante estis membroj de post 1906, — krome kelkaj aliaj malnovaj membroj ricevis diplomon. Poste okazis inaŭguro de nova silka standardo donacita de la membroj al la klubo. Pro la havigo de la standardo la klubo ŝuldas specialan dankon al s-ro Rünnerheim (Malmö) kaj D-ro Albiol (Hispanujo). La Sveda Esp.-Federacio sendis sian plej eminentan membron por bondeziri nin, nome s-ron Paul Nylén. El la cetera programo speciale ĝojigis nin solokanto de la aktoro Dag Vestberg kaj la vira kantaro „Sängerbröderna“.

Alvenis granda nombro da salutoj kaj bondeziroj el la tuta mondo, kiuj estis laŭlegataj. Al ĉiuj koran dankon!

Post la solenaĵo okazis vespermanĝo en rest. „Kungsparken“; ĉeestis 165 gesamideanoj.

La urbaj gazetoj bone raportis pri la jubileo, kelkaj kun bildoj. La klubo gazetoto eliris okaze de la jubileo en pli granda formato; interalie ĝi enhavis statistikon pri la membronombro — ĝi montras belan progreson de la iama klubeto je unu el la plej grandaj Esperanto-societoj en Svedlando.

La Klubo Esperantista en Malmö prenas la okazon por atentigi pri la **jarkunveno de Sveda Esp.-Federacio**, kiu okazos en Malmö dum pentekosto.

H. N.

## Esperanta leĉero el Liepaja (Latvio).

Sur la bordo de la Balta Maro kuŝas urbo Liepaja. Liepaja estas konata pro sia neniam glaciĝanta haveno, kaj kiel banloko. La marbordo estas glata, senŝtona kaj kovrita de blanka sablo, pli malproksime de pinbarego. Bangastoj povas ĝui belegan banon en sala klara akvo de la maro, sunumi sin en varmega sablo aŭ kuraci sin per specialaj varmegaj ŝlimbanoj aŭ aliaj.

En tiu ĉi urbo jam la 11-an jaron labor-emaj gesperantistoj propagandas Esperanton, aranĝante ekspoziciojn, kursojn, prelegojn ktp. Jam 11 jarojn ekzistas Liepaja Esperanta Societo, situas en Helenes-strato n-ro 2 kaj havas ĉ. 50 membrojn.

Ĉijare notinda estas aranĝita jarfestvespero de Liepaja Esperanta Societo en urba Kuracdom-salono, la 28-an de marto. En la programo estis kantoj latvaj, rusaj, ĉeĥaj, grekaj, havajaj kaj aliaj, kantataj latve kaj esperantlingve de operolistoj. Operolisto tenoro Alfredo Tiltinš, kiu estas ankaŭ esperantisto, tre belsone plenumis siajn kantojn kaj ariojn, same bele kantis s-ino Mirdza Saumanis. La unuan fojon kantis esperantlingve operolisto baritono Frico Pukitis. Li promesis estontece en ĉiuj de li aranĝotaj koncertoj kanti esperantlingve kelkajn kantojn. Krom tio en la programo estis deklamoj, popoldancoj kaj muzikaĵoj. Muzikprezentadojn plenumis pianistino f-ino E. Ignats. Vicprezidanto de la societo E. Erhards parolis interese pri la Esperantomovado. Pentristo K. Saumanis donacis por la loterio belegan pejzaĝon. La vespero estis vizitata de ĉ. 400 personoj, kaj pere de ĝi ni esperantistoj denove faris gravan propagandon inter pli vasta publiko en nia urbo Liepaja.

L. E. B.

## Leĉero el Jönköping (Svedujo).

Nia tre simpatia samideano, Lakshmiwar Sinha, vizitis nian urbon la 24-an kaj la 25-an de aprilo. Krom prelego publika antaŭ ĉ. 200 personoj pri la alloga temo „Ceylon, la insulo de la eterna printempo“, bone kaj lerte interpretita de s-ino M. Jensee, s-ro Sinha dufoje prelegis por popolinfanoj kaj iliaj instruistoj pri la interesa temo „Mia vivo kiel knabo en la hinda ĝangalo“, kiu multe interesis la geinfanojn. Ĉeestis ĉ. 400 infanoj. Poste s-ro Sinha prelegis pri Tagore kaj lia instrumentado en la societo de la geinstruistoj; ĉeestis ĉ. 100 personoj, kaj fine li prelegis ĉe kursfina festo por gelernantoj en Laborista Altlernejo antaŭ ĉ. 100

personoj. Do entute s-ro Sinha prelegis antaŭ ĉ. 800 personoj. Sukcesego! La intereso por la prelegoj plialtiĝis dank' al tio, ke s-ro Sinha en la jaro 1930 prelegis en nia urbo kaj tiam instigis nin lerni Esperanton. Do li estas la kreinto de nia movado en Jönköping, la urbo de l' alumetoj, kaj la geesperantistaro ĉi tie treege ŝatas lin. Antaŭe s-roj Joseph R. Scherer el Los Angeles, Raden Mustapha el insulo Java kaj la Tirola Kvaro vigligis nian rondon, kaj nun ankaŭ s-ro Sinha donis al ni nepriskribeblan antaŭenpaŝon.

La verdstelportantoj en Jönköping per tiuj ĉi simplaj vortoj volas esprimi al s-ro Sinha korprofundan dankon pro afableco veni al nia urbo kaj helpi nin en nia laboro disvastigi nian karan lingvon. Ni ĉiuj kore alvokas: „Ĝis baldaŭa revido!“

La Gejenioj.

## Ni recenzas.

**L. Sinha: Hindu rigardas Svedlandon.** 200 pĝ. 14×21 cm. Kun titolbildo (portreto de la aŭtoro) kaj kun multaj ilustraĵoj inter la teksto. — Prezo broŝ. 3,75 sved. kronoj. Ĉe la eldonejo: Förlagsföreningen Esperanto u. p. a., Stockholm, Svedlando.

Eble tio estas la unua fojo, ke ano de la nacio de R. Tagore kaj Gandhi verkis tiel kompletan kaj samtempe tiel interesan priskribon pri lando de tute alia geografia situo, de tute malsama kulturo. Ebligis al li tion la bona scipovo de Esperanto kaj, per tio, la intima amikiĝo kun samideanoj en ĉiuj partoj de Svedlando. Certe ne povas ni, nesvedoj, juĝi pri la korekteco kaj trafeco de la priskriboj. Sed ni povas trankvile eklegi la libron, eksciinte per la Antaŭparolo de nia sveda samideano, la tre ŝatata en sia hejmlando profesoro Björn Collinder, ke lin frapis la „mirinda kapablo (de Sinha) kapti kaj desegni la esencajn trajtojn en la spirita fizionomio de fremda popolo“. „Sinha“, li skribas, „restadis du tri jarojn en Svedlando kaj li uzis bone sian tempon. Travagadinte ĉiudirekte la landon, li konas ĝin ekstere kaj interne. Lia libro tiel abundas je faktoj, ke eĉ la plimulto da naskitaj svedoj certe trovos en ĝi sufiĉe da instruoj.“ Jes, sed pli instrua kaj pli interesa la libro de Sinha ja estas por ĉiuj nesvedoj, kiuj interesiĝas pri tiu bela lando en la nordo kaj pri ĝia simpatia popolo. Ankaŭ la vizitintoj de la 26-a Universala Kongreso kaj de la ekskurso al Laponio trovos en ĝi multe da interesindaĵoj kaj renkontos en ĝi multe da jam konataj aferoj, kaj kun plezuro ili rememoros pri la agrablaj tagoj kaj semajnoj, pasigitaj inter la svedaj kaj multe da alinaciaj amikoj okaze de la kongreso.

La libro etsas klare presita sur tre bona papero, kiel oni kutimas konstati ĉe ĉiuj libroj de la Eldona Societo Esperanto en Stokholmo. Multaj ilustraĵoj (pli ol 100) kaj geografiaj skizoj ornamas la verkon, donante al ĝi ankoraŭ pli grandan valoron.

Resume: Denove unu el tiaj libroj, kiuj estas samtempe instruaj kaj utilaj por la esperantisto kaj valoraj kiel propagandiloj ĉe la neesperantisto.

R-ano.

**C. C. Cowling: Pri la iamaj Tasmanianoj.** 12 pĝ. kaj kovriĝo, 14×22 cm. Prezo 9 pencoj (proksimume 0.60 sv. fk.). Ricevebla de la aŭtoro, ĉe Christ College, Hobart, Tasmanio.

Interesa etnografia skizo pri popolo formortinta, t. e. pri la antaŭaj loĝantoj de la insulo Tasmanio, sudoriente de Aŭstralio; pri iliaj aspekto, iloj, manĝaĵoj, ecoj, lingvoj, loĝejoj, sociaj rilatoj; pri la unua renkonto de blankuloj kun la indiĝenoj; pri traktado kaj formorto de l' Tasmanianoj ktp. La prezo ŝajnas iom alta, sed eble en Aŭstralio la preskostoj estas pli altaj ol alilande.

M.

## Gazetoj pri Esperanto.

**D. T. M.,** Rio de Janeiro, Brazilo, anglalingva eldono, n-ro 1/1936. Turisma propaganda revuo, lukse eldonata, kun interesaj artikoloj kaj belegaj ilustraĵoj, inter ili efika, duonpaĝa bildo pri la stando de Brazilia Esperantista Ligo en la Turisma Montro de Rio, kun konforma teksto.

**Jornal do Commercio,** Rio de Janeiro, Brazilo, 20. 3. Enhavas recenziĝon de la konata libro pri radio de E. Aisberg, originale verkita en Esperanto kaj jam tradukita en multaj naciaj lingvoj, nun ankaŭ en la portugala-brazilo. — La sama ĵurnalo en sia numero de 11. 3. enhavis informon pri Esp.-programo en la „Horo de Brazilo“ (per Radio Tupy).

**Des deux côtés du détroit,** monata revuo de la Franca Komerca Cambio en Londono, en ĉiu numero publikigas artikolon en Esperanto. La marta numero enhavas artikolon pri la vasta uzado de Esperanto en Japanujo; la aprila numero enhavas artikolon de P. L.: „Neordinara transporto de ŝipo surlande“ (aperintan ankaŭ en Heroldo).

**Der Holzmarkt,** Wien, 3. 3. Artikolo pri „paŝo, klinko kaj akrigo“ de segiloj, kun Esp.-traduko de la titolo.

**Politika,** Beograd, Jugosl., 28. 4. Enhavas ampleksan artikolon de B. Jakšić pri la Esp.-instruado en la Zagreba Porblindula Instituto.\*

**Hrvatski List,** Osijek, Jugosl., 25. 4. Kun „Esperantska kronika“ (13 artikoletoj).



# Reforma Kurac-hejmo por Esperantistoj.

Estas bedaŭrinda fakto, ke en niaj eŭropaj landoj la sanstato de la kulturaj popoloj malprogresas.

Malgraŭ tio, ke estas malhelpitaj la mortigaj epidemioj per la progresintaj higienaj kaj la desinfektaĵaj metodoj, ni tamen devas konstati kun teruro ke abundas, ekzemple, la timiga kancero, la ftizo, la nerv- kaj kormalsanoj, la urin-acid-malsanoj, la malforteco de okuloj, la kropo, la dentkario, tiel ke nur malmultaj homoj estas indulgataj de la supre nomitaj aŭ aliaj malsanoj. Kulpa pri tio estas la moderna homo mem, kiu ne plu vivas laŭnature, sed inverse akceptas la troigitan kulturon, ne pripensante ĝiajn detruajn postsekvojn.

Precipe kondukas al malsanoj la uzado de senvalorigitaj, semineraligitaj blankaj farunoj, blanka sukero kaj la pligrandigita konsumado de viando. Ni forlasis grandparte la naturon kaj estis kaptitaj de ĝuavido, de manĝegemo, de alkoholismo, nikotinismo, kaj fine la naturo perfortita venĝis per marasmo, kaduko, malsanoj.

La kulturhomaro malfortiĝis kaj degeneris. Oni aplikas venenojn kaj volas per tio forigi la dolorojn, kiuj ja estas nur simptomoj de la malsano, anstataŭ kontraŭbatali la kaŭzon de la multegaj malsanoj. Ĉi tiu nome estas la falsa, perversa, tro albumenhava, mortkuirita nutraĵo.

Multaj miloj da suferantoj povus esti savataj, se ili decidus, transiri al paradiza, al saniga nutrado.

Sennombraj, kiuj feliĉe ekkonis tion, konsideritaj pli frue kiel nekuraceblaj, estas nun, kiel anoj de laŭnaturo frukt- kaj legoma nutraĵo, sanaj kaj freŝaj.

Certe, ĝis nun multnombraj suferantoj estis konvinkitaj, ke ilin nur povas savi la operacia tranĉilo. Ili aŭdi la ĝojigan sciigon, ke ekzistas operacio sen tranĉilo, tio estas la fastaj kuracadoj. Estas la elita kuracado por la ĝis nun nekuraceblaj. Plursemajnaj tuffastadoj purigas la korpon de ĉiuj malsanigaj materoj kaj toksinoj. Ja la homo vere estas post la fastado kvazaŭ novnaskita kaj ankaŭ aspektas ekstere rejunigita je jaroj.

Jam kelkaj reformsanatorioj ekestis en la lastaj jaroj en eŭropaj landoj, kiuj skribis sur siajn flagojn la laŭnaturo kuracadon kaj atingis belegajn sukcesojn.

Al niaj karaj samideanoj ni povas ĝoje sciigi, ke nun ankaŭ en Meitingen (Bavario) ekestis tia kurachejmo por ne daŭre en lito kuŝantaj suferantoj aŭ homoj, kiuj bezonas elfundamentan refreŝigon.

La fondinto de tiu reforma hejmo estas katolika pastro kaj malnova esperantisto doktoro Metzger. La sanigejo estas gvidata de reformkuracisto el München, kaj la fleg-



Dum ludado apud la Reforma Kurachejmo.

ado prizorgata de gefratuloj de la Krist-Reĝo-Societo de Blanka Kruco. Kelkaj fratuloj estas fidelaj esperantistoj kaj ĝojus, se ili povus helpi siajn karajn gesamideanojn el ĉiuj landoj kaj de ĉiuj konfesioj. La hejmo estas sociala verko por suferantoj, malpli monon posedantaj. Pro tio la prezoj ne estas altaj.

Kursoj por vivrenovigo kaj anima novnaskiĝo okazas en la kuracejo. Do tiel same la korpo kiel la animo ricevas valoran doton de ĉio, kio mankis al ili antaŭe.

Detalajn informojn pri la Reforma Kurachejmo donos volonte nia samideano Fratulo Friedbert König, Meitingen bei Augsburg (Bayern), Germanlando.

Represo en aliaj Esperanto-gazetoj kaj publikigo de traduko en naciaj gazetoj dezirataj. Bonvolu sendi pruvekzempleron al Fratulo Rupert Datz, Meitingen bei Augsburg. Antaŭan dankon!



En la parko de la Reforma Kurachejmo.

Sed ni havas ankoraŭ alian motivon. La provinco Friesland ĝis nun estis iomete izolita. Pro la mondĉama mardigo, kiu ligas la provincojn Noord-Holland kaj Friesland, tiu izoliteco ne plu ekzistas, kaj iom post iom la mondo sciigas, ke la lagoj de Friesland apartenas al la plej belaj en la mondo. La esperantistoj nun havas la okazon konatiĝi kun tiuj lagoj.

La Ŝtata Fervojo donas grandan rabaton al la kongresvizitantoj. Al ĉiu kongreskarton estas slipo fiksitaj. La karton oni montru ĉe ĝiĉeto, kie la slipo estos deprenata, kaj oni ricevos bileton por la vojaĝo al Leeuwarden kaj returne; ĝi validas 5 tagojn, kaj kostas nur: de den Haag guld. 5.28, de Amsterdam 3.78, Arnhem 4.48, Utrecht 4.83 ktp.

La kongreskotizo estas: por la tuta kongreso guld. 1.75; por unu tago 0.75.

Petu aliĝilon aŭ plurajn informojn de la sekretariato de la LKK, fraŭlino Laverman, Molenpad 69, Leeuwarden.

Ĉiu esperantisto estos bonvena, kian ajn religion aŭ politikan konvinkon li havas.

## Internacia Esperanto-Kurso

por la geoficistaro de Poŝto, Telegrafo kaj Telefono en Arnĥem, 6—16 julio 1936.

Post la du grandsukcesaj internaciaj Esperanto-kursoj por PTT-geoficistoj, okazintaj en 1933 kaj 1934, la Internacia Cseh-Instituto de Esperanto en kunlaboro kun la Generala Direkcio de la Nederlanda PTT kaj kun la Internacia Ligo de Esperantistaj Poŝt- kaj Telegraf-Oficistoj (ILEPTO), organizas

la trian internacian kurson de Esperanto por la geoficistaro de PTT, kiu okazos en la Esperanto-Domo en Arnĥem (Nederland), dum la tagoj 6—16 julio 1936.

La kurso estos gvidata de Andreo Cseh, laŭ lia konata metodo (sen lernolibroj, sen uzo de nacia lingvo, sen hejma laboro, en praktika kaj amuza maniero) kaj ĝi kapabligos al skriba kaj parola uzo de la lingvo Esperanto en simpla ĉiutaga interrilato, speciale sur la kampo de PTT.

La kurslecionoj okazos dum 10 labortagoj, matene de la 9-a ĝis la 13-a horo. Dum la posttagmezoj estos ekskursoj studaj kaj plezuraj, interalie al la granda nederlanda radio-stacio en Kootwijk, plenumanta la telegrafan servon kun Nederlanda Hindujo. En la vesperoj okazos amuzaj aranĝoj.

La kurso servos ankaŭ kiel ideala okazo por internacia interkonatiĝo kaj interamikigo de la diverslanda PTT-kolegario.

En la kurso partopreni povas ĉiuj geoficistoj de la PTT, kune kun siaj familianoj. Partopreni povas ankaŭ personoj, kiuj jam scias la lingvon Esperanto. Kurzkotizo estas: 7.50 ned. guldenoj, por plujaj anoj de la sama familio nur 5.— guld. Kursanoj loĝantaj en la Esperanto-Domo pagas nur 5.—, resp. 3.— guldenojn.

La kursanoj povos loĝi en la hotelo de la Esperanto-Domo, kie plena pensio (komforta ĉambro kun fluanta akvo kaj la tri manĝoj) kostas por unu tago kaj unu persono: 3.50 guld. (aparta ĉambro), 3.— guld. (2—4 litoj en unu ĉambro), kaj 2.50 guld. (5—10 litoj en unu ĉambro). Servmono 10%. En la komunaj ĉambroj la litoj estas disigitaj per kurtenoj.

Aliĝante oni sendu la kurzkotizon kaj mendu la hotelon, pagante la pensionprezon por almenaŭ du tagoj.

Adreso por aliĝoj kaj informpetoj: Internacia Cseh-Instituto de Esperanto, Riuwstraat 172, Den Haag, Nederlando. (Poŝtkonto: Den Haag 162626).

Favroj. — Estas kreita speciala fondo por subvencii partoprenantojn, kies ekonomia stato ne ebligas la partoprenon. Petojn por subvencio oni sendu al la supra adreso, kiel eble plej baldaŭ. Ĉe la disdono de la subvencioj preferon ĝuos tiuj petantoj, kiuj aldonis al sia petskribo ankaŭ ian ateston aŭ rekomendleteron (de la oficeja estro aŭ de PTT-fakorganizajo).

Libertempo. — La Gen. Direkcio de la Nederlanda PTT decidis doni al la partoprenantoj 6-tagan ekstran libertempon.

Peto. — La legantoj de ĉi tiu anonco estas petataj vaste diskonigi la informojn pri la kurso en la nacia gazetaro, precipe en la fakaj gazetoj, kaj instigi siajn proprajn PTT-estarojn kaj fakorganizajojn, ke tiuj de sia parto delegu kaj subvenciu partoprenantojn. Donacoj por la subvencia fondo estas danke akceptataj. — Invitletoj al la PTT-direkcioj de ĉiu lando estas jam dissenditaj de la Nederl. PTT-Direkcio, tra la Univ. Poŝta Unio en Bern.

## Parolas la leganto.

### Infankursoj.

En la lasta tempo oni en multaj gazetoj internaciaj legis pri infankursoj kaj pri la manieroj kapti la intereson de la infanoj; sed, karaj kolegoj: ĉu vi faris la plej simplan eksperimenton? — nome: okazigi kurson por la infanoj? Pri ĉiuj novaj aferoj la infanoj ĉiam estas interesitaj, ili estas lernemaj, kaj ili jam havas en la kapoj ĉiujn gramatikajn regulojn — ili tuj scias, ĉu tiu vorto estas substantivo, verbo, akuzativo ktp. Pro tio ili ege rapide lernas nian lingvon. Ofte oni skribas, ke lerni nian lingvon estas infanludo, sed kial do ne doni la ludilon al la infanoj? Estas multe pli bone doni ĝin al infanoj, kiuj tre ŝatas kaj uzas ĝin, ol doni ĝin al plenkreskuloj, kiuj ofte mense estas „tro grandaj“ por akcepti „la demokratian latinon“.

En februaro mi komencis kurson por kelkaj gelernantoj en la aĝo de 12—14 jaroj, kaj nun, malpli ol tri monatojn poste, ili skribas kaj parolas Esperanton multe pli bone ol plenkreskuloj lernintaj nian lingvon dum unu jaro. Ĉi tie mi volas citi ion, kion skribis lernantino 13-jara; sed unue mi rimarkas, ke la kurso okazas nur unu fojon ĉiusemajne kaj ĉiam sabato de la 3-a ĝis la 4½-a horo posttagmeze, do post streĉa lerneja laboro. Ŝi skribis pri la arbaro, kaj jen mi reskribas, tute kiel ŝi skribis en sia kajero:

### La arbaro.

La arbaro estas bela la tuta jaro. Ĝi estas bela en la vintró, kiam la neĝo estas sur la branĉoj de la arboj. Ĝi ankaŭ estas bela en la aŭtuno, kiam la ruĝaj kaj flavaj folioj kuŝas sur la tero. Sed plej bela la arbaro estas en la somero. La arboj estas verdaj, kaj inter ili kreskas herbo. Sur la branĉoj sidas birdoj, kiuj kantas. En la dimanĉo multaj homoj iras al la arbaro, kie ili ĝojas pro la bela naturo kaj birdkanto. La maljunaj homoj sidas en la herbo, kaj la infanoj ludas inter la arboj.

Ŝajnas al mi, ke tiu rezultato estas sufiĉe kontentiga; do, ne hezitu, gekolegoj, sed tuj agu — plej bele sonas nia lingvo en la buŝo de infanoj! Ni fosu nian sulkon kaj bone preparu la estontecon!

Kw. Ha. Andersen.

## LAU MELODIO AMATA: Sopiro al Hispanujo.

(Laŭ Em. Geibel, melodio de C. G. Reissiger.)

Bela lando Hispanio,  
Fora ĉe la Ebro-bord',  
Patrolando, super ĉio  
Vin mi amas ĝis la mort'.  
Dum la muĝo de la maro  
Sub ĉiel' el brila or'  
Ombras la kaŝtan-arbaro,  
Lumas la migdala flor'.

Longe jam de dom' al domo  
Kun sopirdolor' sen lim'  
Mi migradas, fremda homo,  
Tra nebula malproksim'.  
Sonas la liut', sur kiu  
Miajn kantojn ludas mi,  
Sed neniu kor', neniu,  
Min komprenas tie ĉi.

Jam delonge ne plu konas  
Ridon mia rememor',  
En animo mia sonas  
Nur la plendo, nur la plor',  
Nur la unu melodio  
Pri la senkonsola sort':  
Vin, patrujo Hispanio,  
Sopiregi ĝis la mort'.

Karl Vanselow.

## Tuimonda Gazetservo.

(Ĉiuj esperantistoj, laborantaj sur la gazeta kampo, utiligu la informojn sub ĉi tiu rubriko por la nacilingva gazetaro.)

### Svedujo preparas por venonta krizo. Komitato por esplori laboreblecojn.

Programo por esploro pri ĉiuj laboreblecoj en Svedujo estas ellaborita de personoj, al kiuj la sociafero ministro komisiis esplori la eblecojn por havigi laboron al senlaboruloj en kriztempo.

Oni petis ĉiujn ŝtatajn aŭtoritatojn kaj instituciojn doni sciigojn pri laboroj, kiujn oni intencas fari en periodo de kvin jaroj. Krome ĉiuspecaj lokaj aŭtoritatoj estas petitaj doni similitajn informojn por periodo de dek jaroj, kaj oni deziras kunlaboron ankaŭ de pli privataj entreprenoj, kiuj tamen havas publikan karakteron, ekzemple malsanulejoj, sportejoj, banejoj ktp.

Laŭ la karakteroj de la koncernaj aŭtoritatoj, entreprenoj aŭ institucioj, la informo estos liverata la 1-an de junio, la 1-an de julio aŭ la 1-an de oktobro.

Kiam ĉiuj informoj estos kolektitaj, la esplora komitato havos eblecon elpensi planon pri distribuado de estonta laboro, tiel ke oni povu tuj doni utilan okupon al senlaboruloj, se vasta senlaboreco iam denove estiĝos.

Sved-Internacia Gazetservo.

### La Internacia Specimena Foiro de Rio.

La urba registaro de Rio de Janeiro, per iniciato de la Turisma Urbdepartemento, estas plenumanta vastan planon, laŭ kiu la Internacia Spec. Foiro de Rio de Janeiro estos treege pliampleksigita kaj ĝia turisma intereso ja pligrandigita. Tiu Foiro okazas regule ĉiujare kaj altiras al la brazila ĉefurbo ĉiam kreskantan nombron da turistoj kaj da ekspoziciantoj. Laŭ la nova organizo-plano la Internacia Specimena Foiro de Rio de Janeiro estos eble la plej rimarkinda en la mondo. Estas konstruota granda banloko ĉe la maro, kun sportplacoj kaj helioterapij kuracejoj. Oni konstruos teatrojn kaj pavilonojn specialajn por artistaj ekspozicioj; en tiu pavilono estos ankaŭ biblioteko por legado de libroj, gazetoj, revuoj kaj oficialaj publikigaĵoj rilataj al ĉio koncernanta la disvolvigon de la brazila ekonomio. Krom tiuj, oni starigos konstruajn luotajn de la ekspoziciantoj.

Alte interesa, ĉe la Internacia Specimena Foiro de nia ĉefurbo, estos de nun speciala lernejo por praktika informado pri ekonomiaj aferoj, la ekspoziciaĵoj de la Foiro servas, aldone al tio, kiel objektivaj elementoj de instruado al la geknaboj.

La loko, kie funkcias nia Foiro, estas admirinda, kaj — oni povas diri — trovas nenian komparon en la mondo: ĉe la mirbela golfeto Guanabara, ĝi rigardas la maron kaj la montetojn, kiuj enkadrigas la tutan ĉarman scenon.

La Internacia Specimena Foiro de Rio de Janeiro estas ĉiujare inaŭgurata en monato aŭgusto kaj funkcias ĝis decembro; tiu jar-tempo estas unu el plej bonaj por vizito al Brazilo.

(Disradiita en Esperanto de: Departamento de Propagando, Rio de Janeiro, Brazilo.)

Se vi deziras legi interesan romanon, sed verkitan en simpla, facila stilo, ni rekomendas al vi la rakonton de Rich. Meyer: „La longa vojo“. Prezo nur gmk. 2.— por la bone broŝurita kaj gmk. 3.40 por la bindita eldono, plus 10% por sendkostoj. Ambaŭ eldonoj estas liverataj kun plaĉa ŝirmkovrilo. — Mendu ĉe Heroldo, Köln aŭ Rotterdam, aŭ ĉe la ceteraj Esperantolibrejoj.

## Nederlanda Esperanto-Kongreso

dum pentekosto, 30—31 majo kaj 1 junio 1936 en Leeuwarden.

la ĉefurbo de la provinco Friesland.

### Provizora programo:

#### Sabato, 30 majo:

Akceptejo en hotelo „Sporzicht“, malfermita je la 1-a horo.

Promenado tra la urbo.

5 h. oficiala akcepto en la urbdomo.

6—7 h. Tempo por manĝi.

7—8.30 h. Verŝajne koncerto en la „Princa Ĝardeno“.

9—12 h. Neoficiala kunesto en hotelo „Sporzicht“. Kunveno de gazetarkorespondantoj.

#### Dimanĉo, 31 majo:

10—12.30 h. Jarkunveno de LEEN.

12.45 h. Komuna fotografado.

1—2 h. Daŭrigo de jarkunveno. Eble malgranda promenado.

6 h. Komuna tagmanĝo en hotelo „De Klenderij“.

7.30—12 h. Festvespero kun alloga programo.

#### Lundo, 1 junio:

9 h. Kolektiĝo por aŭtobusekskurso al la arbaroj kaj erikejoj (Beetsterzwaag). Pikniko en la arbaro. Per aŭtobuso al Grouw. Je la 1-a horo enŝipiĝo en Grouw por ĉeesti grandan velkonkurson sur la lago. Returne per boato al Leeuwarden. Fermo je la 5-a horo.

Ni instigas precipe la eksterlandanojn, viziti ĉi tiun kongreson. Kompreneble ni unu-loke faras tion por la Esperanto-movado kaj por nia nederlanda kongreso, kaj ni kredas ke la alloga programo tute kontentigos la vizitantojn.



## Tanko en la servo de paca esplorista entrepreno.

En Horgen, Svislando, konstruiĝas nuntempe nova speco de tanko. Ĝia esenca diferenco kompare kun aliaj tankoj estas, ke la nova tanko ne servos al hombuĉado, sed al scienca esplorado kaj kolektado.

Estas projektite fari esplorvojaĝon en la brazilaj prarbaroj de Matto Grosso (Matu Grosu) kaj speciale laŭlonge de la riveroj Xingū (Ŝingū) kaj Tapajoz (Tapaĵoz). Dume ĝis nun prarbaraj ekspedicioj povis antaŭeniri nur penade helpe de portistoj, en konstanta vivodanĝero, la speciala tanko multe faciligos la enpenetron en la arbaregon. Kromtasko de la tanko estos protekti la kolektitan materialon kontraŭ pereco. Laŭsperte tia materialo suferas ĝenerale en la pluvoriĉaj tropikoj pro malsekeco kaj insektoj.

Jen kion diras la svisa iniciatinto de la esplorvojaĝo kaj konstruisto de la tanko, s-ro Arnold Bachmann (Bafman) pri tiu ĉi nova veturilo:

Por mi estas nobla tasko konstrui tankon, kiu ne servos al sangverŝado kaj militirenezo, sed kiu faciligos la pacan konkordon de la prarbaro. Milittankoj ne servus tiun celon.

Enpenetro en la arbaregon kaj precipe en la regionon de la rivero Xingū estas tre malrapida. Pro tio la tanko estas konstruata por ne pli granda rapideco ol 1—4 km. po tago. Tamen speciala mekanismo ebligas esceptokaze veturi pli rapide.

Sur firma tero la veturilo sin antaŭenŝovos pere de raiĵoj. Ĉio estas konstruata kun eksterordinara forteco por kontraŭstari ĉiujn eventualojn. En la antaŭa parto troviĝos plurajn kvadratmetrojn granda ŝtalplataĵo por rompi aŭ terenigi arbojn, trunkojn, herbodensajn ktp. La raiĵoj mezuros 8½ m. laŭlonge kaj 40 cm. laŭlarĝe. En la trabaro fera oni pendigos elastece kabinon kaj sur la flankaj feraĵoj fiksiĝos plataj ovoformaj naĝiloj demunteblaj, dividitaj je malgrandaj ĉeloj por eviti subiĝon en kazo de difektiĝo. Demuntite la naĝiloj estos uzebaj kiel boatoj, en kies laŭlonga pasejo la esploristoj povos komforte sidi. Same kiel sur boatoj oni fikso remilojn. La naĝiloj ripozas sur la raiĵoj kaj pro tio ne povos suferi difekton de malsupre. Ili estos 8 m. longaj kaj kapablos porti 6000 kg.

La kabino, 7,4 m. longa, havos flulinian formon. En ĝia antaŭaĵo, starloko permesos al la filmisto fotografi, kaj liberigi la vojon de barantaj lianoj ktp. helpe de negrosabro. Malantaŭ la starloko troviĝos la pilotejo kun tabulo enhavanta la necesajn instrumentojn de kontrolo. En la kabino estos loko por du akvomalvarmigataj motoroj kun entute 80 ĉevalpovoj. La malvarmiga sistemo donos eblecon por kunporti abunde akvon. Sed ĉiutempe oni povos enpumpi el la riveroj akvoprovizion, ĉu destilataj por trinkeceloj, ĉu por la motoroj. Tiuj ĉi movos dentradaron, kiu siavice laŭ la pozicio de direktilo movos ĉu la mekanismon de la raiĵoj ĉu tiun de la ŝpeliĉo. Lignokarburatoro instalita en la malantaŭaĵo de la tanko liveros al la motoroj tra tuboj la gason por ilia funkciado. Antaŭ ĝia alveno al la motoroj la gaso trapasos filtron retenanta kuntrenitajn karberojn. Estos eble ŝarĝi la gasaparaton de ekstere aŭ de interne. Mantenoj sur la ekstera vando, muntitaj laŭlonge de malgranda irplataĵo ĉirkaŭ la tanko, igos tiun laboron facila. La elĝantaj gasoj de

la motoroj eniros specialan sistemon antaŭviditan por rapidaj konservlaboroj, varmekstoj, varmigo de la veturilo en kazo de temperaturfalo, varmigo de akvo ktp.

La kabino havos kupolon, de kiu oni ĝuos liberan elvidon ĉiufanken kaj sur kiu troviĝos du reflektoroj lumigeblaj per du akumulatoroj. Tiuj ĉi reŝarĝiĝos per la motoroj. Super la kupolo puŝmildigiloj protektos ĝin kontraŭ difektiĝo. Dudek kvar rondaj malfermeblaj fenestretoj heligos la internajn de la kabino. Densmaŝaj retoj malhelpos la enpenetron de moskitoj kaj aliaj insektoj. En la meza parto troviĝos la dormejo; kompreneble ke tiun ĉi ne karakterizos dolĉemolaj litoj. Hamakoj pli-malpli permesos ripozi kaj du flankaj benkoj sidiĝi; kompletigos la dormejon enplankigebla tablo. Post depreno de la hamakoj tiu ejo povos servi ankaŭ al aliaj celoj: studado, fotografaj laboroj.

Malantaŭ la dormejo sekvos la filmturo. Starante sur malgranda plataĵo, la filmisto povos, turnonte manradon, elŝovi sin el la turo por fari siajn observojn aŭ fotografiajn tri metrojn super la tanko. Enfalumo certigos la akuratan lumimpreson. Ŝrankoj en la flankaj vandoj de la kabino estas gardloko por la fotografa kaj esplora ilaro. Inter la kupolo kaj la filmturo oni aranĝos dratretan etaĝaron por transporti sur ĝi provizojn en lutitaj kestoj. De la filmturo la linio de la tanko malleviĝas. Tien oni muntos kaptilojn, precipe por la noktinsektoj.

Tra du pordoj oni povos enrampi en la kabinon, sub kies planko estos loko por ĉiusecaj provizoj dezireblaj por sekurigi la sukceson de la entrepreno.

Dum varmega vetero la motorpumpilo kaj truetojn havantaj tuboj, kurantaj laŭlonge de la flankaj eksteraj vandoj de la tanko, donos eblecon refreŝigi tiujn ĉi per ilia akvumado. Cetero la veturilo ricevos blankan koloron por reflekti la varmajn sunradiojn. Fulmkaptiloj ne mankos, kaj radiosendilo nin kunligos kun la ekstera mondo.

En ĝisnunaj ekspedicioj estis ege malfacile hejmenporti sendifektajn botanikajn kolektojn. Tiun problemon definitive solvos nia tanko. Novaj botanikaj kaj zoologiaj trovitaĵoj, geografiaj, antropologiaj kaj etnografiaj konstatoj estu la rikolto, destinota al svisaj sciencaj institutoj.

La esplorista grupo konsistos el du brazilaj scienculoj, po unu brazila kaj paragvaja prarabar-esploristoj, unu germana esploristo de radioj, unu nederlanda zoologisto, unu konata filmisto — ĉar ĉion interresan oni surfilmigos —, unu kuracisto kaj mi. Ĉiuj partoprenontoj ricevos inokulon kontraŭ la flava febro, inokulon farotan la unuan fojon de la Instituto Pasteur en Parizo.

Se iel eble, la ekspedicio ekvojaĝos en la malfrua aŭtuno ĉijara al Brazilo por povi fine de aprilo venontjare transiri la Matto Grosso'n, por atingi la Amazonan Riveregon. De Cuyaba ni transpasos Serra Azul (Montaro Blua) por alveni al Simon Lopez, civilizita kolonio indiana. Tie, ĉirkaŭ 30 indianoj, Bakairioj kaj Kobokleroj, aliĝos la grupon. La vojaĝo fariĝos trigupe. La unua, esplora grupo celos trovi la plej konvenan teritorion por la trapenetron; la dua grupo preparos la vojon markitan de la unua; la tria grupo fine, la vera ekspedicio

kun la tanko, notos kaj kolektos ĉion sciindan dum la antaŭenmarŝado.

De Simon Lopez oni direktiĝos renkonte al Ronuro, de kie la duono de la indianoj reiros kun la muloj al sia hejmloko. La aliaj akompanos la tankon dum la tuta daŭro de la ekspedicio. Ili uzos kanotojn farotajn dumvojaĝe el ŝeloj de arbogigantoj. Kompreneble la indianoj servos nur kiel gvidantoj, ĉar la tanko ne povos doni loĝlokon al pli ol maksimume 15 personoj. Rio Pará estos la fina celo de la vojaĝo, kiu ampleksos ĉirkaŭ 3000 km. Oni kalkulas por la veturo de Simon Lopez al la rivero Xingū kvar monatojn, kaj opinias atingi la Amazonan riveregon nur en la malfrua aŭtuno.

Antaŭ la prarbara ekspedicio la tanko submetiĝos al praktikaj provoj. Ĝi veturos maren sur la Rejno; surtere aŭ surakve oni veturos al Lisbono; tie enŝipiĝos; en Buenos Aires denove surakviĝo kun sekvonta veturo al Cuyaba sur la riveroj Plata kaj Paraná.

Ne necesas speciale akcenti kaj substreki, ke nur bonege ekipita ekspedicio povas riski la entreprenon en la febotremigan Matto Grosso'n. Kaj efektive la preparaj laboroj datumas de jaroj. La plej grandan danĝeron signifis ĝis nun la terura insekta mondo: formikoj, moskitoj, venenaj skaraboj, skorpioj, birdaraneoj, akaroj, serpentoj, pulegoj. La tanko malplidangerigos tiun ĉi novan esplor-entreprenon. Dum la kolektado kompreneble la esploristoj ne estos protektataj de la tanko, sed ankaŭ pri tio oni pensadis, kaj propraj rimedoj estos aplikataj kaj novaj vojoj irataj.

Ni esperas, ke post kelkaj monatoj ni povos publikigi ilustraĵojn de la priskribita novspeca tanko, al kies konstruado ni jam nun deziru ĉian sukceson. —ro—

Postskribo: Reprodukto kaj traduko en aliaj ĵurnaloj dezirataj. Sendu ekzempleron al G. Rotach, Brückenstr. 15 a, Bern, Svis-ankoraŭ povus atingi nin.

## La Infero de Dante en sia interna unueco.

De D-ro Vincenzo Musella.

(Vidu en n-ro 15 de 12 aprilo 1936!)

(Fino.)

Veninte tien, kie la femuro artikiĝas en la diko de la kokso, Virgilio vidas rokan truon. Tiam li, ne lasante la vilojn de Lucifero, sin eltras tra tiu roka truo kaj eksidigas Dante'n sur ŝtonon. Poste, iomete ripozinte, la du poetoj, daŭrigante sian supreniradon, ekiras sur sekretan kaj malluman vojon, gvidataj de la zumo de rivereto, „kiu mal-supreniras tra la mallarĝa elmodita roko-buŝo“ kaj „kiu, devenante de la unika tero de la suda duonsfero (t. e. de la Purgatorio), povas esti nur Leto, kien la animoj iras por sin lavi kaj forskui la pekojn post la pentoj“ kaj „kiu poste, ĝin elaçetinte el ĉiuj pekoj, alportas al Lucifero ĝiajn malbelaĵojn, kiel indan depagon ŝuldatan al li“.

Tiel, Dante kaj Virgilio, por reiri al la ĉielblua mondo, devas marŝi en la mallumo kaj, memkompreneble, trairi vojon, kies longo tute egalas la longon de la tuta Infero. Sed, dum la priskribo de la vojaĝo tra la Infero estis tiel enhavoriĉa, ke ĝi postulis de Dante preskaŭ tutan kantikon, — kontraŭe, tiu ĉi vojaĝo en la mallumo, kiun la du poetoj plenumas ne zorgante eĉ pri la plej eta ripozo kaj nur celante eliri

je ĉioma horo ĉu taga ĉu nokta. Oĝe okazis, ke la deĵoranta soldato estis ĝismorte timigita per mistera „huŝŝŝŝŝŝ“ kaj paŝdirektis la armlon nur por malkovri, ke iu hundaĉo, revenanta el nokta ekskurso, sin trairis tra akvokanalo.

Krom la bojado ĉirkaŭ la kuirejoj, la hundoj havis ankaŭ alian sporton, ĉasante ratojn, kaj ĉi tiu ilia amuzo estis la plej utila servo, kiun ili faris kaj dank' al kiu ili estis tolerataj en la kazerno.

Kiam fine ili fariĝis tia plago, ke dum la prelego de la tagordono la serĝentoj estis ĝenataj per senĉesa bojado de la petolaj bestaĉoj, kiuj ne povis kompreni, kial ĉiuj kompanianoj dum tiu solena momento trivice senmove staras anstataŭ kun ili ludi, kaj kiam la deĵoranta oficiro raportis, ke li dumnokte ne povis kontrol-eniri iun ĉambron, ĉar la hundoj, kuŝantaj sub litoj, lin minacis per tre kompreneblaj sonoj, la komandanto decidis ekstermi ilin por savi la bonan reputacion de la kazerno. Intuge subite aperis la urbaj senfeligistoj kun longaj maŝhavaj stangoj, elkaptis la hundojn kaj, metinte ilin en kaĝegon sur malgranda veturilo, forveturigis ilin.

Ekkestis granda tumulto en la kazerno, ĉar la soldatoj, volante savi siajn amikojn, ĉarimede malhelpis la senfeligistojn. Tamen nur malmultaj hundoj sukcesis saviĝi tra la bariltruoj kaj akvokanaloj, nur nokte riskante la revenon por diskonigi la morton de siaj fratoj per korŝira ululado, sidante en la korto kun nazegoj levitaj al la helnokta luno.

Kaj tiam okazis miraklo: la regimento eliris en la regionon por fari plurtagajn manovrojn, kaj dum sia migrado tra urbetoj,

kiel eble plej baldaŭ por revidi la stelojn, estas prezentita de Dante per nur sep versoj.

Kaj, jen, fine la suprenirado estas plenumita, kaj Dante kaj Virgilio eliras el la vasta abismo kaj reatingas la surfacon de la globo, tamen ne plu en la norda duonsfero loĝata de la homoj, sed en la suda duonsfero, kie estas la Purgatorio.

Kaj la Infero de Dante estas plenumita: „Ni supreniris, li la unua, mi la dua, ĝis, fine, mi ekvidis kelkajn belajojn portatajn de la ĉielo tra randa truo; kaj, poste, ni eliris, por revidi la stelojn.“

Kaj nun, ni imagu en nia fantazio homon, kiu, estante en ega templo, kie ĉiu detalo estas arta verko (kaj, kie ajn estas beleco, tie oni estas ĉiam en templo), havas je sia dispozo nur kelkajn momentojn por viziti iujn el la senfinaj ĉefverkoj: li turnos tien ĉi kaj tien siajn maltrankvilajn kaj mirigitajn okulojn; li provos kapti ĉion en sia superrigardo; sed, ho ve!, baldaŭ li eksentos sian senpovon, kaj tiel li restos miregita, ne atentante eĉ unu el la multaj belajoj.

Ne tre malsaman impreson oni havas, kiam oni provas kapti per unu superrigardo la tutan Inferon de Dante. Temas pri sennombraj mondoj entenataj en unu mondo, temas pri sennombraj poemoj harmonie intermiksita en unu poemo, temas pri sennombraj lumoj fandiĝintaj en unu lumo. Ni provu superrigardi ĉi tiun atomoplenan korpon, ĉi tiun partoplenan tutajojn, ĉi tiun steloplenan ĉielon: kaj jen baldaŭ ni eksentos la tutan malgrandecon de nia mano, la tutan miopecon de nia rigardo, la tutan malvasteccon de nia menso. Sed, se, forlasante ĉiun ideon de sintezo, ni ekiras tra la maro, levos la velojn de la ŝipeto de nia menso kaj marŝos sur la postsignoj de Dante „malantaŭ lia ŝipo, kiu kantante transiras“, ho, tiam nia horizonto plilarĝiĝos kiel sorĉe, tiam nia mano iĝos pli pova, kaj nia rigardo pliakriĝos, kaj nia menso, libera kaj sennebulita, kaptos fulme ĉiujn abismojn kaj ĉiujn kulminojn atingeblajn de la homa penso en ĝia kapturniga flugado. Kaj la lumo ekbrilos: kiu povas diri, kiom da lumo brilas en tiu malluma mondo, de kiam ĝin enpenetris la lumoplena spirito de Dante? Nu, ni mem enpenetru ĝin samame, samspirite, samkrede, kaj ĝi lumigos nin. Kaj al la homaro kiu batalas kaj laboras, al la homaro kiu suferas kaj timas, al la homaro kiu celas eliri el la mallumo kaj sin tremi en dian maron de spirita lumo, al tiu ĉi homaro vivanta en la mallumo sed avide soifanta la lumon, ni rekantu la poemon de la mallumo, ni rekantu la Inferon de Dante: kaj se ni ĝin krede revivos, se ni ĝin spirite suferos, se ni batalados por nia elaçeto el la mallumo, la elaçeto ne forestos.

El la mallumo eliras la lumo. Kaj el la profunda mallumo, kiun Dante trairis kaj skulptis per siaj diaj versoj, brilegos al ni, la tagon kiam ni kapablos eltralegi la poemon de Dante kun vera ama intelekto, bel-ega radio de dia lumo.

Fino.

Rim. de red.: Kiel daŭrigon, ni publikigos post nelonge alian artikolon de D-ro Vincenzo Musella titolatan: „La Purgatorio de Dante en sia interna unueco“.

## Esperantistoj!

Memoru ĉiam, ke vi estas pioniroj de grava kultura ideo, — ke, batalante por Esperanto, vi servas al via propra popolo kaj al la tuta homaro!

vilaĝoj kaj vilaĝetoj per la odoro de siaj kuirejoj, ĉevaloj kaj la sorĉo de la soldataj uniformoj, al kiu neniam hundaĉo kapablis rezisti, altiris al si kaj revenis en la kazerneon kun nova, fiera kaj multnombra, ĝojbojanta sekvantaro. Pojar.

### Rido sanigas.

Komenco.

„Nu, ĉu fraŭlino Hanjo donacis al vi buklon dum via hodiaŭa renkontiĝo?“  
„Buklon ankoraŭ ne; sed haron mi jam havas, ĝi — kuŝis en la supo.“

### El la lernejo.

Instruisto: Kial Adamo kaj Evo vivis tiel feliĉe en la paradizo?  
Lernanto: Tial ke ili ne havis bopatriinon!

### Dum teatroprezentado.

Dum prezentado de teatraĵo ekstaris iu rigardanto, tiel ke la sinjorino, kiu sidis malantaŭ li, ne vidis plu la scenejon. Do ŝi diris al la staranto: „Ĉu vi ne bonvolas sidigi vin, sinjoro?“ — „Mi tre dankas vin“, respondis ĉi tiu, „sed mi ne estas laca.“

### Revoko.

En iu vilaĝo, vilaĝano diris, ke la duono de la komunumaj konsilantoj estas azenoj. Pro tio li estis devigata revoki. Li deklaris, do, ke la duono de la komunumaj konsilantoj ne estas azenoj.

## La regimenta hundaro.

Mi ne scias, kiam unue en la prahistorio la hundo fariĝis kunulo de la homo, sed mi kredas, ke ĉi tiu pratempa dato estas intime kunligita kun iu batala speco de entrepreno, ĉu militiro aŭ granda ĉasado de iu prahoma tribo, kiam la hundo, flarante la sangon kaj karnon de mortigitaj bestoj aŭ homoj, alproksimiĝis al sia estonta sinjoro, trovante ĉirkaŭ li manĝaĵojn kaj pli poste riŭĝante sub la protekton de lia pli alta intelekto.

Nur tiel estas klarigebla, kial la hundoj sin sentas altirataj al soldatoj kaj kial en kazerno en malgranda garnizono estis tiom da fremdaj al neniuj apartenantaj hundoj. Ili estis hundoj, hundegoj kaj hundetoj diversspecaj, diverskoloraj kaj diversrasaj; sed ili ĉiuj estis hundaĉoj kun la plej avida apetito, ĉiam funkcianta stomako kaj neniam malfortiganta optimismo pri eventuala peco da viando aŭ pano, jetita al ili de iu bonkora soldato. La ĉirkaŭaĵoj de la kuirejoj kompreneble estis ilia paradizo, kaj ili neniam mankis la horon de la manĝodisdonado, farante sian eblon por veki ĉies simpatian per sia bojado, saltado kaj aliaj petrimedoj, per kiuj ili ĉiam sukcesis akiri novajn provizojn por siaj nesatigeblaj stomakoj.

La kuirejoj havis siajn favoritojn, al kiuj ili troplenigadis la ventrojn kun tia malavareco, ke certaj voĉoj eĉ diradis, ke la hundoj manĝas pli bone ol la soldatoj. Sed pro tio oni ne ĵaluzis kaj neniuj soldato rifuzis hundon, kiu satmanĝinte ĉe la kuirejo postkuris lin en la korto bojpetante pri la

peco da pano, kiun la soldato tenis en la mano por formanĝi.

Mi rememoras hundeton ne pli grandan ol kato, karbonigran kaj malĝajokulan, kiu, tromanĝinte ĉe siaj amikoj kuirejoj, kutimis digesti sur la sojlo de la proviantejo. Ĝi faradis tiel, verŝajne, pro dankemo, kaj la kuirejoj, sciante pri ĝia kutimo, des pli troplenigadis ĝian stomakon. La bedairindaj skribistoj, ne povante aŭskulti la senĉesan sibleton kaj singultadon de la dispepsia hundeto malantaŭ la pordo, ripetfoje dum la tago estis devigitaj eliri en la koridoron kaj piedfaliĝi la bestaĉon malsupren de la ŝtuparo. Ĝi akceptadis la altuŝon de iliaj pezaj malmolaj botegoj kun akra altona ululado; sed apenaŭ ili refermis la pordon, jam ĝi vikle suprengrimpis la ŝtupojn kaj, ĉesigante siajn protestojn, reprenis sian digestan laboron sur la sojlo. Ĝi estis neforpelebla.

La hundoj estis inteligentaj bestoj kaj bone sciis, ke iliaj veraj amikoj estas la simplaj soldatoj, dum ke la oficiroj, devante zorgi pri la bona ordo en la kazerno, ne devis ilin toleri. Ili pro tio tre sperte sciopovis distingi la diversajn rangojn kaj eviti malfavorajn renkontiĝojn. Ili eĉ neniam eniradis la kazernon aŭ eliradis tra la ĉefpordo, ĉar tie la gardantoj estus devintaj ilin forpeli; sed ili havis aliajn vojojn, akvokanalojn aŭ truojn en la bariloj de la apudkazernaj ĝardenoj, tra kie ili je viva envio de ĉiuj soldatoj libere kaj senĝene pasadis,